



# MAGAZINO

Organo de la Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj  
Organ des Freien Esperanto-Bundes für deutschsprachige Gebiete

## Soll eine Esperanto-Zeitschrift deutsche Texte bringen?

Meines Erachtens ist diese Frage eine Diskussion wert. Viele Leser von *Magazino* sind der Auffassung, daß eine Zeitschrift einer Esperanto-Organisation in Esperanto erscheinen soll, wenn nicht gar muß. Andere, auch einige Redaktionsmitglieder wie Gary Mickle und Albert Stephan, machen zu diesem Thema auf die Satzung des Freien Esperanto-Bundes aufmerksam. Es heißt im § 2,1: 'Der Bund stellt sich die Aufgabe, die Weltsprache Esperanto in den breitesten Bevölkerungsschichten bekannt zu machen [...] Zu diesem Zweck sollen geeignetes Werbematerial [...] herausgegeben werden...' Weiter wird auf § 3 der Satzung aufmerksam gemacht.

Die Paragraphen besagen also, daß der Freie Esperanto-Bund die Aufgabe habe, deutsche Staatsangehörige über Esperanto zu unterrichten, für die Verbreitung zu sorgen und Esperanto-Sprachkurse möglich zu machen. Mitgliedschaft im Bund, auch noch, nach Beherrschen der Sprache, in SAT, Sennacieca Asocio Tutmonda, werden empfohlen.

Auf welche Weise kann geworben werden? Geeignetes Werbematerial wird herausgegeben, soweit die finanziellen Verhältnisse des Bundes es zulassen. Ich bin der Meinung, daß *Magazino* in geeigneter Aufmachung zur Werbung beitragen, wenn nicht gar besonderes Werbematerial ersetzen kann. Die Bundeskasse muß stets soviel Finanzen zurückstellen, wie vier *Magazino*-Ausgaben im Jahr kosten. Darüber hinaus noch vorhandenes Geld wird dann für Werbematerial und andere Ausgaben bereitgestellt sein. Unser Finanzverwalter vollzieht zwar gekonnt jedes Jahr eine finanzielle Gratwanderung, brauchte jedoch bisher noch nicht 'Pleite' anmelden.

*Magazino* ist zweierlei: Informationsdienst für Mitglieder und Freunde und eine Möglichkeit, Mitglieder, die just Esperanto lernen, und Nochnicht-Esperantisten zu informieren. Im ersteren Fall wird unser Bundesorgan Texte in Esperanto herausgeben, evtl. mit Übersetzung, im zweiten Fall sollten deutsche Texte erscheinen, die übersetzt

sind, wenn die Redaktion meint, daß die Inhalte zum Beispiel Esperantosprechern im Ausland zugänglich gemacht werden sollten.

Kurz und gut: Ich plädiere für weitestgehende Zweisprachigkeit. Dennoch würde ich mich über Zuschriften, unterstützende oder kritische, aus dem Leserkreis zu diesem Thema sehr freuen.

Einstweilen verbleibe ich mit besten Grüßen

Ihr Albert Stephan

### Enhavo:

	paĝo
<b>Soll eine Esperanto Zeitschrift deutsche Texte bringen?</b>	
(A. Stephan)	1
Ĉu Esperanto-gazeto aperigu germanlingvajn tekstojn? (A. Stephan)	2
Trafi la gustojn kaj bezonojn de du celgrupoj (G. Mickle)	2
Ĝis nun akiritaj spertoj pri unu-kaj dulingveco (K. H. Kersting)	3
Referendumo 1997	3
Nova LEA/G-Estraro	3
LEA/G-kunveno	4
Leteroj al la redakcio	4
Novajoj	5
Daŭre varbi por SAT kaj aliĝi al SAT!	6
Ĉu naciismo ofte subfosas Esperanton?	6
Multekostaj patentotradukoj	6
Edith kaj Walter Poppeck festis sian diamantan geedzec-jubileon	7
Konsiloj de Lapenna	7
Ĉu vi malsatas?	8
Al miaj samlandanoj / An meine Landsleute (B. Brecht / trad. M. Retzlaff)	9
La friponaĵoj per la kafo	9
Bosniaj rifuĝintoj rajtu resti	10
Nia hejmpaĝo en Interreto	10
Ĉu Esperanto estas politika afero?	11
Faklibroj	12
Lingva angulo	12

## Ĉu Esperanto-gazeto aperigu germanlingvajn tekstojn?

Laŭ mia opinio, diskuto pri ĉi tiu demando indas. Multaj legantoj de *Magazino* opinias, ke gazeto de Esperanto-organizo aperu en Esperanto. Aliaj, kiel ankaŭ kelkaj redakciaj membroj – Gary Mickle kaj Albert Stephan – atentigas koncerne ĉi tiun temon pri la statuto de la Libera Esperanto-Asocio. Oni povas legi en § 2, ke la asocio havas la taskon konatigi la mondan lingvon Esperanto al la plej larĝa loĝantaro. Por tiu celo la asocio eldonu taŭgan varbmaterialeon. Krome interesa por la celo estas la § 3 'Rimedo por atingi la celon.'

La paragrafoj do esprimas, ke la Libera Esperanto-Asocio havas la taskon informi anojn de la germana loĝantaro pri Esperanto, zorgi pri disvastigo de la lingvo kaj ebligi lingvajn kursojn. Membreco en la asocio, sed post scipovo de la lingvo ankaŭ en SAT, estas rekomendataj.

Per kiu metodo oni povas varbi? Eldono de varbmaterialeo estas ebla, kiom la stato de la asociaj financoj permesas. Mi opinias, ke *Magazino*

povas kontribui al la varbado, eble anstataŭi varbilojn. La asocia kaso devas ĉiun jaron havi tiom da mono por pagi kvar eldonojn de *Magazino*. Kroma mono ebligas pagon de elspezoj por varbado kaj aliaj taskoj.

*Magazino* havas du taskojn: esti informilo por la membraro kaj geamikoj, esti ebleco por Esperanto-komencantoj kaj homoj, kiuj ne parolas Esperanton, ricevi informojn pri Esperanto kaj la asocio. En la unua kazo aperigos nia organo tekstojn en Esperanto, eble tradukitajn, en la dua kazo aperu germanlingvaj tekstoj, kiuj estu tradukitaj, kiam la redakcio opinias, ke per ili eksterlandaj legantoj estu informataj.

Mi pledas por plejeble larĝa dulingveco. Tamen mi ĝojus pri alskriboj, ĉu subtenaj ĉu kritikaj. Ĝis tiam mi restas kun plej bonaj salutoj

via Alberto Štefano

## Trafi la gustojn kaj bezonojn de du celgrupoj

«Trafi du celojn per unu ŝtono» estas ĉiam kontentige, sed ĉu la *Magazino* estas tia plurcela ĵetajo? La fono de ĉiuj ĉi pritraktoj estas la komencita diskuto en la Estraro kaj inter berlinaj membroj pri speciala germanlingva bulteno de LEA/G, kiu plenumu ĝuste la taskon de publika informado. K-do Stephan eldonis dum la pasintaj jaroj kelkajn numerojn de la *Pressedienst*, kiu estis sendita al la redakcioj de sindikataj kaj aliaj gazetoj. Oni diskutis pri tio, ĉu pli ofte aperanta tia germanlingva bulteno estas dezirinda, kia estu ĝia enhavo, ĝiaj aspektoj kaj amplekso, ĉu ĝi vere estas financebla, kaj ne laste, kiel ĝi nomiĝu. Nek la propono *Esperanto links* nek *Esperanto progressiv* ricevis ĝeneralan aplaŭdon. Ĉu eble iu leganto havas ideon? Unu berlina membro (ne mi, kiu pro tempomanko ne pli ol akcesore kunlaborus) ŝatus eble okupiĝi pri tiu tasko venontjare, kiam li disponos pri pli da tempo. Substrekindas, ke tia eldonagado ankoraŭ ne estas funde diskutita, sed indas jam nun mencii ĝin, ĉar ĝi rekte rilatas al la temo pri la lingvo(j) uzenda(j) en la *Magazino*.

Ĝis nun la *Magazino* estis legita de membroj kaj diversaj (parte eksterlandaj) abonantoj. Ili – eble estas kelkaj esceptoj – regas Esperanton. Kelkaj ne regas la germanan. Ili bezonas periodaĵojn, kiuj ebligas interŝanĝi opiniojn kaj spertojn kun politike similtendencaj esperantistoj kaj eble ankaŭ okazojn por praktiki la lingvon.

Germanlingva bulteneto estus direktita al ne-esperantista publiko kun bezono je tre bazaj informoj pri la lingvo mem, ĝia aplikado, ĝia komunumo kaj tute aparte pri ĝia laŭ ni ne bagatela loko en la sortimento de maldekstraj (aŭ progresivaj)

strebaĵoj. Aktualaj novaĵoj kaj raportoj el la medio de SAT kaj la cetera maldekstra esperantista medio ilustrus la lastenomitan punkton. Temas ja pri periodaĵo. Por povi distribuiĝi iom grandkvante – kompreneble senpage – ĝi devas esti malmultekoste produktata kaj neampleksa.

Per tio mi venas al alia grava konsidero: ni ne estu rivaloj de GEA. Se ni ne sukcesus produkti eldonaĵon, kies enhavo kaj politika engaĝiĝo unuavide diferencas de tiu, kiun montras la eldonaĵoj de la «neŭtrala»\* movado, tiam la laboro estus superflua duobla laboro. Pli bone estus tiuokaze sendi la disponeblan novaĵmaterialon al Ulrich Matthias por aperigo en *Esperanto-Informationsdienst* de GEA. Mi certas, ke la subkuŝanta politika tendenco kaj la arsenalo de tipaj argumentoj en la eldonaĵoj de tiu «neŭtrala» movado ne estas ĉiam optimumaj en tiu maldekstra medio, kiu serioze alcelas ŝanĝi la socion fundamente kaj supervenki la kapitalismon. Mi tute ne kritikis la «neŭtralan» movadon (en kiu mi membras jam delonge) pro tio, sed konstatas, ke ni povas suplementi ĝian laboron per nia propra en specifa medio.

Tiu bulteno devus verŝajne esti neregule aperanta unufolia (do dupaĝa) eldonaĵo: tiu modesteco fontas el realismaj konsideroj kaj pri la disponebla tempo ĉe la prizorgantoj kaj el financaj konsideroj. Gravas, ke ĝi havu rekoneble alitipan enhavan profilon, konvenan enhavon entute kaj plaĉan grafikan aspekton.

Tio kondukis min iom for de la temo, kiun k-do Stephan diskutigis. Sed kredeble mi per tio jam klarigis, kial la *Magazino* laŭ mi restu ĝenerale

esperantlingva, kun esceptoj en kelkaj kazoj, kiam apartaj cirkonstancoj pravigas tion.

\* Ke mi metas la vorton «neŭtrala» inter citilojn, havas kialon. La kontraŭpolitikismo kaj politika strutismo, iam fortaj en la ĝenerala movado, cedis laŭ mia impresado multege da tereno. UEA kaj GEA montras klaran tendencon favori la plifortigon de internaciaj institucioj kaj alprenas klaran starpunkton i.a. pri la rasismo kaj la kunvivado de

diversaj etnoj en Germanio. Tiuj starpunktoj ne estas «neŭtralaj», sed situas maldekstre de la objektiva politika mezo. Ili estas ĉio alia ol mal-simpatiaj. Mi tamen kredas, ke la potenciala rolo de la Esperanto-movado, resp. de Esperanto en la batalo por radikale alia socio estas *nia* temo. Jen la bariero, kiun supersalti la ĝenerala movado ne emos, almenaŭ ne baldaŭ.

Gary Mickle

## Ĝis nun akiritaj spertoj pri unu- kaj dulingveco

Louis de Beaufront, tre verŝajne la unua franca esperantisto, fondis en januaro de 1898 la «Societon por la Propagando de Esperanto» kaj ties organon *L'Espérantiste*. La organo estis *dulingva*.

Komence oni konsideris ĝin kiel modelon, sed baldaŭ oni rimarkis ankaŭ la negativajn sekvojn. En la societo kolektis sin multaj aprobantoj, simpatiantoj kaj fine eternaj komencantoj. La amaso da membroj neniam funde lernis la lingvon. Kial ankaŭ? Pere de dulingva gazeto ili estis instruitaj pri ĉiuj aferoj.

Mallonge dirite, mi opinias, ke oni per dulingva gazeto ne servas la aferon. Por varbi sufiĉas flugfolio, se ĝi donas respondon al la kutimaj demandoj aŭ ankaŭ antaŭjuĝoj. Mi montras apude revuojn kiel *FEN-X* de Esperanto Nederland, *SAT-Amikaro*, *Monato* kaj nia *Magazino*, se ĝi estas skribita preskaŭ komplete en la sennacieca lingvo.

Kiam la redakcio intencas skribi iom en la germana lingvo, tiam mi petas, ne sur la unua paĝo. La unua paĝo estas la reklamsildo de nia firmao.

K. H. Kersting

[Ĉi tiun kontribuon la aŭtoro titolis «Letero de leganto», sed ni aperigas ĝin ĉi tie, ĉar ĝi teme rilatas al la enhavo de ĉi tiu numero. GM]

### Referendumo 1997

69 aktivaj membroj rajtis partopreni la elekton de nova estraro por la periodo de 1997 04 01 ĝis 1999 03 31. Voĉdonis 43 membroj, t.e. 69% de la aktivuloj. Jen la rezulto:

	jes	ne	sindeteno
Estraro	41		2
Konsilantoj	43		
Konflikt-komisiono	42		1
Revizoroj*	35	7	1
Magazino-redakcio	43		
Statuto**	34	1	8

\* La referendumo havas eraron. Proponitaj estis: Jiri Proskovec kaj Hans Rodewig, ambaŭ el Dortmund. La propono devis teksti: Jiri Proskovec kaj Hans Jankowski, ambaŭ el Dortmund. Ni petas pardonon kaj petas tiujn, kiuj ne akceptas la korekton, protesti ĉe la nova estraro (Libera Esperanto-Asocio, Renchener Str. 47, D-77704 Oberkirch (Baden). Sekve de la protestoj, ni denove voĉdonigos pri la pozicio «revizoroj».

\*\* La Financoficejo Dortmund ankaŭ nian novan statuton ne akceptas. Ili informis, ke SAT ne rajtus ricevi la kapitalon de LEA/G en la kazo de asocia likvido (§10 de la statuto), ĉar SAT estas organizo sub franca jurisdikcio. La LEA/G prezidanto protestis telefone kaj oni klarigis, ke LEA/G ja ne devas pagi imposton pro malalta kapitalo. Ni estonte nur ne plu rajtas elskribi t.n. impostefikan atestilon.

Ni gratulas al la novaj estraranoj kaj deziras, ke ili same aktivu kiel ĝis nun.

La Balotkomisiono

### Nova LEA/G-Estraro

Per la Referendumo de 1997 69% de la aktivuloj elektis jenajn kamaradojn, kiuj akceptis la funkcion:

Prezidanto:	Albert Stephan, Oberkirch
Anstataŭanto:	vakas
Sekretario:	vakas
Kasisto:	K. H. Kersting, Essen
Konsilantoj:	Friedel Bues, Hannover K. E. Paech, Lochham Hans Rodewig, Hannover
Revizoroj:	J. Jankowsky, Dortmund J. Proskovec, Dortmund
Magazino-redakcio:	Gary Mickle, Berlin Hans Rodewig, Hannover A. F. Stephan, Oberkirch
SAT-peranto:	Jiri Proskovec, Dortmund

Ĝis troviĝos servopretaj LEA/G-anoj, la prezidanton anstataŭas, kiam necesas, provizore k-do Mickle; sekretarian laboron prizorgas provizore k-do Stephan.

AFS

## LEA/G-kunveno

Estas 'en la steloj', ĉu ĝi okazos, ĉar nur tre malmultaj LEA/G-anoj partoprenos la SAT-Kongreson en Aŭgsburgo. Aliflanke, kunvenos dum la kon-

gresa lundo la LEA-Komitato de SAT sub gvido de k-do Cavalier. Ĉiu kongresano rajtas partopreni en ĉi tiu kunveno.

AFS



## LETEROJ AL LA REDAKCIO



skribis A. Legros, F-93140 Bondy pri «Mondo de komputilo» en *Magazino* 18:

Komputilo estas nespecifa termino por iu ajn komputiva ilo, ekz.: abako, glit-kalkulilo, kalkul-maŝino, kalkulatoro, komputoro (laŭ *Suplemento* al *PIV* (1987)).

skribis Vladislav Hasala, SAT-peranto por Ĉeĥio, Strážnice (1997 04 19):

Kiel vi povas rimarki, do post pli ol sufiĉe longa tempo mi donas almenaŭ vivsignon [...] Dum la lasta tempo mi bonorde ricevis jenajn numerojn (de *Magazino*), por kio mi elkore kaj sincere dankas vin: [sekvas indikoj].

Por via informo mi ankaŭ kunsendas *Liston de Esperanto-periodaĵoj en CZ-landoj* aboneblaj pere de mia eteco ekde 97 03 02. Momente temas pri 19 titoloj [...] Kompreneble, ke en kazo de via intereso ni povus kunlabori rilate la *Magazino*. Ĉio dependas nur de nia reciproka interkonsento ktp., ĉu ne? [...]

indiko de k-do Erich Seidemann, Gelnhausen (97 04 17):

Nur dies zur Kenntnisnahme: Im *Magazino* 1/97 [n-ro 18] stimmt für die Sommerzeit die Hörzeit für ORF Wien nicht. Maßgeblich für uns ist dimanĉo 16.05 h. [...] Unstimmig ist auch, daß der Intendant Lendvai im Fragebogen kein Wort für Esperanto oder Zamenhof findet!

skribis k-do Nussbaum, Kolonjo, pri la referendumo de 1997 (97 04 11):

[...] Vi eble miros pri la de mi farita demandsigno je la demando, ĉu oni akceptas la novan statuton [...] Mi trovas la statuton akceptinda, sed min fakte ĝenas unu vorto. En la lasta linio de § 6.2 «Die Bundesmitgliedschaft ist nicht gleichzusetzen mit der individuellen Mitgliedschaft in SAT; sie sollte zusätzlich eingegangen werden.» – La vorto «sollte» ne tute plaĉas al mi. Tio aspektas iomete deviga! [...] mi estus skribinta «es wird empfohlen, diese zusätzlich einzugehen» aŭ simile. Mi ne estas kontraŭ SAT[...]. Mi nur estas kontraŭ ĉio kio iel devigas min fari aŭ lasi ion. Ni ne estas GEA kun pli aŭ malpli deviga membreco en UEA, pro kiu deviga membreco ja verŝajne estis fondita nia LEA, aŭ ĉu mi eraras?

Cetere, ankaŭ mi ricevis malbone legeblan *Magazino* n-ro 17. Tio ne nepre signifas, ke mi atendas donacon de E-libro [...]

skribis Willi Brandenburg, Telgte (97 04 07):

[...] dankon por la teknike perfekta *Magazino* n-ro 18. En mia ekzemplero [de n-ro] 17 la paĝoj 3, 5, 7, 8, 9 estis

parte aŭ tute nelegeblaj. Mi domaĝas la vanan laboron; eble vi povus okaze ripeti plej gravajn tekstojn [...]

skribis A. Redecke, Hanofro (97 04 09):


[...] En via referendumo '97 estas eraro. 1) Revizoroj ne ambaŭ loĝas en Dortmund. 2) Ne skribu *Hanovro*, sed *Hanofro*. En Esperanto oni parolas fonetike – tiam oni skribas *Hanofro*. Por la poŝto vi devas skribi *Hannover*. La poŝto ankaŭ ne konas la urbon *Munkeno*, sed *München* [...] Vi ne volu enpaŝi la vojon de R. Ŝulco aŭ Behrmann (Hermano Bermano) [...]

skribis Max Hocke, München (97 04 23):

Al la «indiano kiu ne konas doloron» – Dankante mi ricevis la tre bonan *Magazino* n-ro 18. Mi vere bedaŭras la terure malfeliĉan estigon de la 17a *Magazino* kaj esperas, ke vi (Stephan – la red.) intertempe resaniĝis. – Kun kora danko pro via vere sindonema laboro, kaj por la prospero de LEA/G amikecajn salutojn [...]

skribis Guy Cavalier, Epinay sur Seine, prezidanto de la LEA-Komitato de SAT (97 04 28):

[...] Legante la lastan bultenon *Magazino*, mi ĝojis, ke vi trovis helpanton el Berlino. Tiu n-ro 18 estas enhavriĉa kaj ampleksa. Mi esperas, ke vi (Stephan) bone resaniĝis kaj ankaŭ mencias, ke la paĝoj malbone inkumitaj en la n-ro 17 ne tro ĝenis mian legadon. La plej difektita estis la dua paĝo en germana lingvo. Mi legis, ke vi klopodas por starigi LEA/G-kunvenon en Aŭgsburgo. Tio estus agrabla momento.



Kiel ano de la tutmonda laboristaro, Daĉjo havis nenion por perdi. Ĝa krom tiuj diablaj ĉenoj...

## NOVAĴOJ

### 1a Renkontiĝo de Liberecanaj Esperanto-Grupoj

«La Liberecana Esperanto-Grupo de Tuluzo (L.E.G.) proponas al ĉiuj liberecanan Esperanto-semajnfirrenkontiĝon en Katalunaj Pireneoj la 20an kaj 21an de septembro 1997. Estas invititaj ĝin partopreni individuaj liberecanaj liberecanaj esperantistoj kaj reprezentantoj de liberecanaj Esperanto-grupoj. La temo de la renkontiĝo estas interkonatiĝi, efektivi kunlaboradon, festumi, esperantumi, ankaŭ eblos trafi la okazon por surpiedigi federacion (E.L.E.F.-projekto, Eŭropa Liberecana Esperanto-Federacio, laŭ propono de Ibera Liberecana Grupo de Madrido).»

«Nur eblos akcepti tiujn, kiuj resendis la aliĝilon antaŭ la 15a de aŭgusto 97.» Aliĝemuloj do *rapidu* kontakti la Liberecanan Esperanto-Grupon, p/a Canal Sud, 40 rue Alfred Duméril, FR-31400 Toulouse (Francio), Faks: +33 5 61 25 95 43. (citaĵoj el: la informfolio/aliĝilo de L.E.G.)

### Hejmpaĝo de Maldekstra Forumo en Interreto

Ĵus fariĝis alirebla en Interreto la paĝo de *Maldekstra Forumo Berlino*. Ĝi informas tre koncize pri la MF kaj ĝiaj celoj. Krome, ĝi ebligas akiri en simpla teksta formato kelkajn informojn de MF aŭ en la originala germanlingva versio aŭ en Esperanta traduko, en unu kazo eĉ en la angla. La motivo por fari la esperantigitajn tekstojn estis, ke negermanlingvaj produktantoj de informiloj pri Esperanto povu konsulti ilin, ĉerpante por propra utiligo tion, kion ili ŝatas, kaj kritikante tion, kion ili ne ŝatas. Jen la adreso: <http://www.dcn.davis.ca.us/~bmickle/MFB/mfb.htm>.

### 1a de majo en Berlino kaj Stokholmo

Ankaŭ ĉi-jare unu ano de la berlina *Maldekstra Forumo* disdonis kelkcent flugfoliojn okaze de la sindikata manifestacio de la 1a de majo antaŭ la «ruĝa urbdomo» (temas pri la koloro de ĝiaj brikoj) en tiu urbo. Kiel ni eksciis el Stokholmo, ankaŭ tie SLEA daŭrigis sian jam multjaran tradicion, disdonante 1700 flugfoliojn ĉe analogaj manifestacioj. Tio estas priferindaj tradicioj kaj disdonkvanto, kaj ni sincere gratulas.

### SATEB subtenas familiojn de sindikatanoj luktantaj

SATEB, la brita LEA, jam antaŭ la kristnaskaj ferioj kolektis mondonacojn por batalantaj dokistoj de Liverpool kaj malsanulejaj purigistinoj el aziaj familioj, kiuj strikis kontraŭ severa malaltigo de siaj salajroj. Ĝi proponis meti siajn internaciajn kontaktojn je ilia dispono, se tio helpus. [el *La Verda Proleto* 1997 04]

### «La mortula ŝipo»: romano de B. Traven esperantigita

Finfine la fama verko pri la travivaĵoj de la usona maristo Gale, verkita de la konata anarkiisma verkisto B. Traven kaj tradukita jam en pli ol tridek lingvojn, ankaŭ en Esperantujo legeblas. Kvankam la libro ankoraŭ ne trovis eldonejon, vi povas havigi ĝin al vi helpe de la interreto. La enhavo de la dosiero TRAVEN.ZIP, proksimume 250 kB ampleksa, estas transŝarĝebla el: <http://www.free.de/FAU/texte.html>. Aldone al la libroteksto ĝi enhavas multajn interesajn informojn: i.a. enkondukon pri la romano kaj la aŭtoro de la tradukinto H.-G. Kaiser, artikolon de la aŭtoro B. Traven pri sia verko, kontaktadreson, la romanon mem, glosaron kaj notojn de la tradukinto pri la diversaj ĉapitroj.

Membroj de la *Maldekstra Forumo* en Berlino volas helpi, por ke la traduko aperu en libra formo (kvankam legemuloj devos ankoraŭ pacienci).

### 1a Jarkunveno de la Itala Laborista Asocio

ILEA okazigis sian unuan jarkunvenon 1997 02 02. La partoprenantoj diskutis pri maldekstraj partioj kaj sindikatoj, kun kiuj la nova organizaĵo volus havi rilatojn kaj formulis peton aliĝi al la Gotenburga konvencio (agnoskiĝi kiel LEA).

### PREM fondita

Fondita estis 1997 02 01 ĉe Fonda Konferenco en Moskvo nova rusia LEA sub la nomo «Popola Rusia Esperanto-movado». Ĝi celas kunlabori kaj kun SAT kaj kun ERA kaj donas al si la taskon disvastigi Esperanton en medioj de progresemaj demokratiecaj kaj maldekstrulaj medioj kaj atingadi politikajn decidojn favorajn al la internacia

lingvo en la internaciaj, naciaj kaj lokaj instancoj, ĉefe inter parlamentanoj de ĉiuj niveloj.

### Max Metzger rehonorita

Max Josef Metzger, de la nazioj ekzekutita katolika pastro, estas jure rehonorita. La verdikto anoncita de la «Popola Kortumo» en 1943 estis nenio alia ol tirado de malamo kaj sekve malvalidigenda, kiel la berlina Landa Kortumo konstatis. el: *Ökumenisches Esperanto-Forum* 1997 06

### 20. Bavelo-Seminar in Tauberbischofsheim

*Die Baden-Württembergische Esperanto-Liga (Bavelo) veranstaltet ihr diesjähriges Seminar vom 5. bis 7. September im Bildungshaus St. Michael in Tauberbischofsheim und lädt dazu herzlich ein.*

*In diesem Jubiläumsseminar steht die Familie im Mittelpunkt. Einerseits wird Eltern und Kindern entsprechend ihren verschiedenen Bedürfnissen ein reichhaltiges Kursprogramm geboten. Andererseits wird es durch günstige Teilnahmegebühren ermöglicht, daß auch kinderreiche Familien teilnehmen können. Esperanto-Interessenten sind mit Freunden und Bekannten willkommen.*

*Anmelde-Unterlagen bitte anfordern bei: Esperanto-Geschäftsstelle Baden-Württemberg, Romäusring 20, D-78050 VS-Villingen. Telefon 07721/22073; Fax 07721/22074*

H. H.

### Apernotoj / Impressum

Eldonanto / Herausgeber:  
Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj / Freier Esperanto-Bund für deutschsprachige Gebiete  
Renchener Str. 47, D-77704 Oberkirch  
Tel. + Fax: (0)7802 - 90 336  
LEA/G per SAT en TTT:  
<http://www.worldnet.net/~sat-esp/>  
Redakcio / Redaktion:  
Albert Stephan (AFS)  
Gary Mickle, Berlin (G.M.)  
Hans Rodewig, Hannover (H.R.)  
Aŭtoroj responsas mem pri siaj artikoloj; la redakcio havas la rajton mallongigi aŭ rifuzi alsendaĵojn.  
MAGAZINO aperas kvarfoje jare / erscheint vier Mal jährlich;  
abonprezo / Bezugspreis 15,- DM  
La membrokotiĝo entenas liveradon de la bulteno.  
LEA/G-konto: Sonderkonto Kersting  
n-ro 416 210-432 Postbank Essen  
(BLZ 360 100 43)

## ***Daŭre varbi por SAT kaj aliĝi al SAT!***

**komuniko sendita de la Plenum-Komitato de SAT:**

Ni multfoje konstatis kaj daŭre konstatas ke multaj personoj, kiuj aliĝas al la Laboristaj Esperantistaj Asocioj (kiel SLEA, SAT-Amikaro, SATEB, HALE, GLEA...) estas konvinkitaj ke tiu aliĝo kondukas ilin al aŭtomata aliĝo al S.A.T. **Tio estas grava miskompreno !**

Ĉiu L.E.A. estas memstara, havas siajn proprajn kotizojn kaj NE ristornas ian ajn sumon al S.A.T. el tiuj kotizoj.

Tio signifas, ke por fariĝi SAT-membro oni devas rekte pagi la SAT-kotizon ĉu al la landaj perantoj ĉu al la sidejo de S.A.T. (S.A.T. havas nur individuajn membrojn kaj tute ne kolektivajn). Ne farante tion oni ne sufiĉe plenigas la kason de S.A.T. kaj tiel mankas al S.A.T. la necesaj rimedoj por efike funkcii.

Do, ekde nun, pagu viajn kotizojn al via Laborista Esperantista Asocio kaj al S.A.T., ĉar S.A.T. bezonas membrojn - sen kiuj ĝi ne povas ekzisti.

Hodiaŭ ni klarigis unu el la kialoj de manko de SAT-anoj (ĉar multaj LEA-membroj kredas sin SAT-anoj). En la venonta artikolo ni provos klarigi kial oni "devas - ideologie kaj politike" aliĝi al SAT.

La Plenum-Komitato de S.A.T.

### ***Ĉu naciismo ofte subfosas Esperanton?***

Dum la lastaj kelkaj jaroj mi iom malkuraĝiĝis, ĉar mi rimarkis unuafoje, ke esperantistoj ne ĉiam rezistis kaj rezistas la premojn de naciismo.

La unua ekzemplo, pri kiu mi legis, rilatas al la periodo en Germanio, kiam hitleranoj venkis. Eĉ de 1931 ekzistis «Nationalsozialistischer Esperanto-Bund», kiu disvastigis naziisman propagandon per Esperanto.

En la sekvantaj jaroj, la neŭtrala movado (GEA) tie grade akceptis kaj praktikis ŝovinismon kaj rasismen. Ulrich Lins priskribis tiajn eventojn en sia verko *La danĝera lingvo*.

Dum la nuna periodo mi rimarkis aliajn, por mi, strangaĵojn. En eks-Jugoslavio, kie jam ekzistis komuna lingvo serbo-kroata - mi legis, ke post la milito kaj genocido estis starigita nova Esperanto-asocio por Bosnio-Hercegovino. Bone! Sed samtempe mi legis, ke estas starigita alia organizo sole por serboj.

En Hispanio mi aŭdis pri katalunaj esperantistoj, kiuj ne volas partopreni kiel parto de la hispana movado.

Lastatempe okazis en nordorienta Francio transnacia kunveno, sed tie kelkaj partoprenantoj insistis, ke ili devas esti traktataj kiel flandroj, ne kiel civitanoj de ekzistanta ŝtato.

Laŭ mia vidpunkto, tiaj sintenoj ne kongruas kun la etoso de la movado.

[artikolo de Ron Lynn el *La Verda Proleto* (SATEB), 1997 04]

### ***Multekostaj patentotradukoj***

Pro la konstanta kresko de kostoj por tradukado de eŭropaj patentoj, la federacia ministro de justico Edzard Schmidt-Jortzig (FDP) riskas nun disputon en Bruselo. Liaj fakuloj volas kune kun la Eŭropa Patentoficejo en Munkeno trapuŝi interkonsenton, ke la patentodokumentoj ne plu devu esti komplete tradukitaj en ĉiujn oficialajn lingvojn de la 18 ŝtatoj-membroj de la EU. Kontraŭ tio kalcitras antaŭ ĉio la mediteraneaj landoj, ĉar ili timas eventualan perdon de signifo por siaj landaj lingvoj. Ili krome konstatas, ke tradukoj estas la ĉefa enspezofonto de multaj patentadvokatoj.

Mezume ampleksa patento de ĉirkaŭ dek paĝoj, kiu validu en ok ŝtatoj, kaŭzas nuntempe 22.000 markojn da tradukokostoj, kaj tio estas 40% de la entutaj kostoj. La eŭropa industrio elspezas ĉiujare ĉirkaŭ 430 milionojn da markoj nur por tradukoj en fremdajn lingvojn. Tuj komence oni antaŭvidis la tradukojn por alirebligi la dokumentojn al ĉiu. Sed nun neniu ajn eĉ rigardas 90% el la tradukoj, kiel plendas oficistoj de la Eŭropa Patentoficejo.

[el *Spiegel* 21/1997]

### **Edith kaj Walter Poppeck festis sian diamantan geedzec-jubileon**

Nia membro Walter Poppeck kaj lia edzino Edith el Oberkirch jam en aprilo festis la 60an datrevenon de sia geedziĝo. Ili povas rerigardi al eventoplena vivo. Ili geedziĝis la 24an de aprilo, 1937. La eventoj de la Dua Mondmilito devigis ilin fuĝi el sia hejma Silezio kaj rehejmiĝi en Oberkirch. Walter Poppeck (naskita en 1913) engaĝis sin multflanke: en la loka politiko, en la SPD kaj la kemiindustria sindikato, ĉe la naturamikoj kaj por Esperanto. Dum multe da jaroj li oficis kiel urba kaj subdistrikta konsiliano, prezidanto de la SPD-frakcio, prezidanto de entreprena konsilio kaj de la loka sekcio de la kemiindustria sindikato en Oberkirch, ankaŭ dum 13 jaroj kiel ano de la ĉefa estraro de tiu sindikato. Ankoraŭ hodiaŭ li plenumas plurajn gazetarajn oficojn. Li laboras nun pri la historio de Esperanto, estante mem atestanto de la epoko antaŭ kaj post la enpotenciĝo de la faŝismo. Jam antaŭ 1933 li estis membro de SAT.

Inter la multaj, tre diversaj honorigoj, kiujn li ricevis, estas la Hans-Böckler-medaliono de la sindikato, la honormedaliono de la franca urbo Gray, kun kies Esperanto-grupo li tenas amikajn kontaktojn, la bronza sigelo de Oberkirch, la honora nadlo de Badenio-Vurtembergo, la federacia meritkrucuro kaj pluraj honoraj prezidantecoj.

"Sen la kunhelpo kaj komprenemo de mia edzino tiu aktivado ne eblus," konstatis Walter Poppeck. Edith Poppeck (naskita en 1914) frue orfiĝis kaj laboris kiel domservistino. Kiel plej grandan teruraĵon ŝi rememoras la militon kaj la postan sorton kiel fuĝanto.

Ambaŭ estas gepatroj de tri infanoj kaj havas ok genepojn. LEA/G kaj la *Magazino* kore gratulas!



Edith kaj Walter Poppeck

### **Ivo Lapenna pri informado kaj ĝia loko en nia agado**

Ivo Lapenna donis al ni kelkajn monatojn antaŭ ol li mortis (15.12.1987) la sekvantajn

#### **Konsilojn**

Informado (propagando), eĉ la plej trafa, apenaŭ havas sencon, se ĝi ne estas ligita al la du aliaj ĉefaj branĉoj de aktivado: instruado de la lingvo kaj ĝiaj praktikaj aplikoj en la plej vasta senco de la vorto. Nur bone studita kaj planita, celkonscia, paralela agado sur la tri kampoj donas kontentigajn rezultojn kun daŭra valoro. Evidente: la praktikaj aplikoj ne povas vastiĝi, se samtempe ne grandiĝas la nombro de lingvosciantoj; tiu nombro ne povas grandiĝi, se forestas la kondiĉoj ebligantaj instruadon kaj lernadon; eĉ la plej bonaj lernokondiĉoj restas senrezultaj, se informado ne kreas la necesan favoran agordon. Aliflanke, informado ne povus krei la favoran agordon, se ĝi havus nenion por diri rilate la praktikajn aplikojn kaj la lerneblecojn, dum akirado de la lingvoscio estus neimagebla sen perspektivoj pri praktikaj utiligoj en plej diversaj formoj.

La tri branĉoj kune, apogantaj unu la alian kaj reciproke apogataj, garantias firman, konstantan progresadon.

En la kadro de tiu interdependeco, la celo de la informado estas:

- a) diskonigi la Internacian Lingvon kaj ĉion kreitan en ĝi aŭ pere de ĝi;
- b) detruai la antaŭjuĝojn, precipe en la ŝlosilaj pozicioj de la kulturo kaj de la publika vivo;
- c) instigi al la lernado de la lingvo kaj altiri novajn adeptojn.

Ekzistas ankoraŭ multaj kazoj de tute abstrakta, senperspektiva informado, nome tia, kiu malatentas la menciitan celon kaj la ligitecon de informado kun la du aliaj branĉoj, same kiel ankoraŭ tro ofte oni centrigas la agadon ĉu sole al instruado, ĉu nur al insistado pri vastigo de la praktikaj aplikoj sen kia ajn aŭ sen sufiĉa paralela laboro en la du aliaj sferoj. Sed ankaŭ abundas kazoj de vere celtrafa informado. Lerte enkadrigita en la ĝenerala agado por la disvastigo de la Internacia Lingvo sur ĉiuj niveloj – monda, landa, loka kaj faka – ĝi donas rimarkindajn rezultojn.

(KHK)

artikolo ĉerpita el *Der Rabe Ralf* (97 02)

## Ĉu vi malsatas?

### Bona manĝaĵo kontraŭ malmulte da mono malebligas al aliaj satiĝi

La produktaĵo de kultivoplantoj forte kreskis dum la pasintaj jardekoj pro aplikado de modernaj teknikoj. Sed oni kare pagas por tio. Ekzemple, malaperas kultiveblaj terenoj pro tro intensa kultivado de la grundo. La tutmonda agrikultura surfaco reduktiĝis de 732 milionoj da hektaroj en 1981 al aktuale 605 milionoj. Rezulte de la moderna agrokulturado, triono de la agroj estas jam neriĝebla damaĝita. Irigacio saligas la grundojn. Ĉirkaŭ 18 % de la mondaj agroj estas irigaciataj. Ili provizas 40 % de la grenrikoltoj; tio estas en la plej bona kazo tempe limigita ebleco. Pezaj agrikulturaj maŝinoj densigas la grundojn, kaj la modernaj altrendimentaj plantovarioj bezonas grandajn kvantojn da damaĝbesticidoj kaj grasumoj, kiel ankaŭ multe da akvo. Monokulturoj estas ekstreme predispoziciitaj al damaĝoj. La moderna agrikulturo estas tiel multkonsekvenca, ke ĉiujare en la tuta mondo surfaco proksimume samampleksa kiel Nederlando iĝas malfekunda kaj devas esti forlasita. La rezisto kontraŭ «genetika sojo» en Eŭropo direktiĝas en tiu senco kontraŭ la naturdetruaj kultivteknikoj, kiuj faras tiuspecajn genetikajn manipulojn entute interesaj.

La eŭropaj konsumantoj kredeble malmulte konscias, ke oni manĝigas trionon de la monda grenproduktaĵo al porkoj, bovoj kaj kokoj. Se ni ĉiuj manĝus nur duone tiel multe da viando, miliardo da homoj povus satiĝi de la «bestofuraĝo». En la latifundioj de la evolulandoj – plej ofte sur la plej bonaj grundoj – oni produktas por la eksporto, dum la propra loĝantaro estas malbone nutrita aŭ malsatas. Kvankam Bharato estas memsufiĉa je greno, triono de la loĝantaro ne satiĝas. Sekve, la homoj translokiĝas el la vilaĝoj en la urbojn.

Certe, oni povas pli rapide bredi per genetikaj teknikoj novajn variojn ol laŭ la konvencia maniero, kiuj estas pli altrendimentaj kaj rezistivaj kontraŭ damaĝbestoj ol la ĝise uzitaj, sed per tio oni ne solvas problemojn, sed nur forŝovas ilin en la estontecon. Ju pli la maŝinafablaj monokulturoj establiĝas, des pli povriĝas la naturo. Ĉar por tia mastrumado, kiuj estas antaŭprogramita por alta rendimento, taŭgas nur malmultaj, ĝuste tiucele breditaj varioj. La indiĝenaj varioj, malpli altrendimentaj, sed bonege adaptitaj, malaperas. Kontraŭ tio ankaŭ ne helpas genetikaj bankoj. En Bharato, ekzemple, eĉ la plej malriĉa kamparano kultivis en antaŭaj tempoj laŭtradicie ĝis naŭ diversaj kultivoplantoj. Komplete malbona rikolto ĉe tia mikso estis preskaŭ ekskludita. Hodiaŭ, unusola viruso povas dronigi en mizero tutan monokulture priokultivan regionon.

La tutmonde kutima agrikultura politiko utilas al la latifundiistoj kaj la agrikultura industrio. Al la ĉi-landa civitanaro ĝi provizas superfluon de malmultekostaj manĝvaroj. Antaŭkondiĉo por alia agrikultura politiko estus kondukŝanĝiĝo ĉe la konsumantoj en la industria landoj. Ili devus konsumi malpli da viando por haltigi la sensencaĵon de la furaĝimportoj, kaj tio estas procezo, kiu jam konturiĝas. Dank' al la «genetika sojo» de Monsanto la interrilatoj nun eniras la konscion de kelkaj pliaj homoj. Kvankam la surfacetendiĝo de la agrikulturo ĝenerale signifas reduktion de rendimentoj, estus nur gajno, se tiu agrikulturo ne plu plenigus la

fridgejojn de Eŭropo aŭ eksportsubvenciite kaosis la merkatojn de la Tria Mondo.

P. Balzar



Ni gratulas al nia fidela amiko Erwin Feder en Duisburg pro lia 50-jara membreco en la movado de la Naturamikoj.

LEAG





**Al miaj samlandanoj**

de B. Brecht (traduko de M. Retzlaff)

Vi homoj la militon postvivintaj,  
Vi estu fine nun memkompatemaj!  
Vi mizeruloj, estu nun pacemaj!  
Sufiĉas militiroj jam estintaj:  
Mi petas, estu al vi kompatemaj.

Vi viroj, prenu trulon, ne tranĉilon!  
Vi sub tegmentoj sidi ĝis nun restus,  
Se vi tranĉilon ne prenintaj estus.  
Kaj sub tegmentoj havus vi trankvilon.  
Mi petas, prenu trulon, ne tranĉilon!

Infanoj, al la patroj kaj patrinoj  
Vi diru laŭte, ke la militadon  
Al vi domaĝu ili, saman suferadon  
Ne volas vi, nek loĝi en ruinoj.  
Domaĝu ili al vi militadon!

Patrinoj, ĉar vi havas ja la forton,  
Armadon kaj militon ne toleri,  
Vi lasu vivi la infanojn, ne suferi!  
Naskiĝon ili al vi danku, ne la morton!  
Patrinoj, lasu la infanojn ne suferi!

Verkita de Breĥto, Bertolto (1898-1956).  
Esperantigis Manfredo Ratislavo (Stettiner  
Str. 16, DE-59302 Oelde) en Februaro de  
1997 laŭ la origina germanalingva teksto.

**An meine Landsleute**

Bertolt Brecht

*Ihr, die ihr überlebtet in gestorbenen Städten  
Habt doch nun endlich mit euch selbst Erbarmen!  
Zieht nun in neue Kriege nicht, ihr Armen,  
Als ob die alten nicht gelangt hätten:  
Ich bitt euch, habet mit euch selbst Erbarmen!*

*Ihr Männer, greift zur Kelle, nicht zum Messer!  
Ihr säßet unter Dächern schließlich jetzt,  
Hättet ihr auf das Messer nicht gesetzt.  
Und unter Dächern sitzt sitzt es sich doch besser.  
Ich bitt euch, greift zur Kelle, nicht zum Messer.*

*Ihr Kinder, daß sie euch mit Krieg verschonen,  
Müßt ihr um Einsicht eure Eltern bitten.  
Sagt laut, ihr wollt nicht in Ruinen wohnen  
Und nicht das leiden, was sie selber litten:  
Ihr Kinder, daß sie euch mit Krieg verschonen!*

*Ihr Mütter, da es euch anheimgegeben:  
Den Krieg zu dulden oder nicht zu dulden,  
Ich bitt euch, lasset eure Kinder leben!  
Daß sie euch die Geburt und nicht den Tod dann schulden:  
Ihr Mütter, lasset eure Kinder leben!*

(Tiu ĉi poemo troviĝas presita en informfolio de la pacifisma organizajo «Ohne Rüstung leben» – Ökumenische Aktion für Frieden und Gerechtigkeit [«Vivado sen armado» – Ekumena agado por paco kaj justeco], Sophienstr. 19, DE-70178 Stuttgart, Germanio.)

**La friponaĵoj per la kafo**

En pli fruaj numeroj de *Ĝisdatigo* vi povis legi pri la sukcesa propagando kaj bojkoto-kampanjo, kiun FAU kondukis kontraŭ la kafo-importanta firmao «Lebensbaum» (signifo: arbo de la vivo). En Germanio tiu firmao grandkvante vendas altprezan «ekologian» kafon produktitan en Meksiko, profitante de la terure malbonaj laborkondiĉoj en la regiono Ĉiapas. Ankaŭ en Germanio la salajroj de la ordinaraj firmaaj dungitoj estas malaltaj. La direktoro de «Lebensbaum» klopodis leĝe malpermesigi la kampanjon pro ties «kalumnio», sed eĉ la kortumoj ne akceptis lian argumenton. Ili subtenis la sindikatan rajton bojkoti! La kampanjo perdis al la firmao kvaronon de ĝiaj kutimaj enspezoj, instigante ĝin repreni sian varban mensogon pri produktado «sub bonaj ekologiaj KAJ SOCIALAJ kondiĉoj». La firmao ankaŭ plibonigu la salajrojn kaj laborkondiĉojn de la dungitoj (precipe kafo-rikoltistoj en Meksiko)! Ĉe la faka foiro «BioFach 97» en Frankfurto ĉe Majno fine de februaro/komence de marto 1997 FAU propagandis sian sukcesan kampanjon. Samtempe ĝi

lanĉis iniciativon «Branĉo-sindikato pri naturaj nutraĵoj / agrikulturo / nutraĵ-prilabora industrio» (GNLL) kadre de FAU.

[el FAU-Ĝisdatigo n-ro 6, 1997 04]

**Ni legis en «Esperantolehti», organo de Esperanto-Asocio de Finnlando:**

- Lernu Esperanton kaj vidu unu urbodomon po jaro... Jen slogano por havigi membrojn, kiuj ŝatas regalojn kun ŝaŭmvino kaj manĝaĵetoj.
- Koboldo parolas Esperanton! Almenaŭ en Iisalmi post du jaroj. En 1999 okazos monda kongreso de koboldoj tie. Slogano por ĝi: Sentu vin hejme. Partoprenu la plej strangan Esperanto-aranĝon!
- La nova oficejo de EAF kaj EKH havos apud si belan manĝejon «Pizzeria Bella». Post kiam la nova Esperanto-oficejo malfermiĝos, ĝi nature rebatiĝos kaj forprenos unu nenecesan «b» el la nomo.

S-ano Z

(KHK)

## Bosniaj rifuĝintoj rajtu resti!

Unu aparte malhoma aspekto de la «ŝparemo» de la germana ŝtato estas la deviga revenigo de bosniaj rifuĝintoj al Bosnio malgraŭ la disdivido laŭ naciismaj partoj, kiun agnoskis la Interkonsento de Dayton (elparolu: *Dejton*). Plimulto de la ĉ. 330.000 bosniaj rifuĝintoj en Germanio estas laŭdevene muzulmanoj, forpelitaj el la regionoj, kiujn kaptis serbaj naciistoj. Reveni tien estus mortdangere. La germania ŝtato laŭdas sin, ke ĝi jam dum kelkaj jaroj «toleris» la rifuĝintojn. Nun ĝi komencas revenigi ilin, senkomplete komdamnante ilin al malmilda sorto. Estas ironio, ke Germanio tamen ĉiujare akceptas ĉ. 200.000 «etnajn germanojn» el orienta Eŭropo, precipe el la posteulaj ŝtatoj de Sovetio. Eĉ se germanevenulo havas nur

unu dokumente pruveblan germanevenan avon, la «feliĉulo» ekrajtas enmigri Germanion kaj post mallonga tempo ekhavi civitanecon, male al la kompatindaj rifuĝintoj el Bosnio. Ŝajne gravas la «germana sango» (kio estas tio?), sur kiu multilate baziĝas la germania civitanec-leĝaro. Germanio do ŝatas ŝpari je la sortoj kaj vivoj de la rifuĝinto por daŭre subteni «sampopolanojn», kiuj multkaze apenaŭ scias unu vorton de la germana lingvo. Kia rasisma hipokriteco! Estas grava tasko subteni la rifuĝintojn por malhelpi la revenigon al Bosnio. Ĉu okupacii preĝejon, kiel jam faris la luktantaj sen-dokumentuloj en Francio?

[el FAU-Ĝisdatigo n-ro 6, 1997 04]

## Nia hejmpaĝo en Interreto

Certe multaj legantoj aŭ ne havas komputilon aŭ ne havas (kiel mi: GM) propran aliron al la Interreto, kaj tial ne povas senpere konatiĝi kun la hejmpaĝo de LEA/G. Tiun eblecon disponigas al ni SAT sub la adreso <http://www.worldnet.net/~sat-esp>, kiel ĝi faras ankaŭ al la aliaj LEA. SAT havas propran retaliron. Kreskas ĉiutage la nombro de potencialaj vizitantoj (t.e. konsultantoj) de la paĝo.

Esperanto-Anhänger aus den Kreisen abhängig Arbeitender gründeten 1911 den Deutschen Esperanto-Bund (Germana Esperanto-Asocio – GLEA). Meinungsverschiedenheiten zwischen Mitgliedern der sozialdemokratischen und der kommunistischen Richtung wegen der Orientierung der Letzteren zum sowjetischen Kommunismus beeinflussten die Entwicklung des Bundes (GLEA); 1930 gründeten sozialdemokratische Mitglieder den Sozialistischen Esperanto-Bund (SEA). 1933 nach der Machtergreifung durch die Nationalsozialisten wurden die beiden deutschen Arbeiter-Esperanto-Vereinigungen zerschlagen.

(Literatur : Illustrierte Geschichte der Arbeiter-Esperanto-Bewegung - 1933 - Herausgeber : Fritz-Hüser-Institut für deutsche und ausländische Arbeiterliteratur, Stadt Dortmund).

Nach dem 2. Weltkrieg verpflichtete sich der vor allem auch von Arbeiter-Esperantisten neugegründete Deutsche Esperanto-Bund zur Neutralität hinsichtlich der Esperanto-Weltorganisationen UEA und S.A.T. (Weltbund der Arbeiter-Esperantisten), die jedoch durch Kollektiv-Beitritt in die UEA 1955 verletzt wurde. Daraufhin gründeten Ostern 1956 vor allem sozialdemokratisch orientierte Esperanto-Freunde den Freien Esperanto-Bund (LEA/G). Es wurde beschlossen, mit S.A.T. zusammenzuarbeiten.

Der Bund macht die internationale Sprache Esperanto in den breitesten Bevölkerungsschichten

bekannt. Lehrgänge für Esperanto sollen den Absolventen die Möglichkeit eröffnen, international direkte Verbindungen von Mensch zu Mensch anzuknüpfen, womit einer übernationalen Gesinnung und Volkerverständigung gedient werden soll.

Der Bund (LEA/G) lehnt jegliche Diktatur ab und sieht in der Entwicklung der Völker zu einer demokratischen, humanitären, freiheitlichen und sozialen Gesellschaft die Basis für seine Betätigung. Es wird vierteljährlich das Bundesorgan LEA/G-Magazino herausgegeben, dessen zweisprachiger Inhalt informiert und einen Esperanto-Lehrgang bietet.

Die Aufgaben werden mit den von den Mitgliedern und Förderern gezahlten Jahresbeiträgen (1996 : 15,- DEM) und Spenden finanziert. Aktives Mitglied kann jeder werden, der die Bundessatzung anerkennt; passive Mitglieder können Personen und Organisationen werden, die den Gedanken der Volkerverständigung fördern und den Bund (LEA/G) ideell und finanziell unterstützen. Der demokratisch gewählte Vorstand (5 Mitglieder) führt in Übereinstimmung mit Beratern die laufenden Geschäfte. Der 1. Vorsitzende vertritt den Bund nach innen und außen. Weitere Informationen auch über S.A.T., Gruppe Deutschland, erhalten Sie bei :

Freier Esperanto-Bund  
Renchener Str. 47  
DE-77704 Oberkirch (Baden)



## Ĉu Esperanto estas politika afero?

*La redakcio danke kvitancas la ricevon de kvar pliaj opiniesprimoj pri la (ne)politikeco de Esperanto kaj pri ligitaj temoj.*

Estas mia plezuro, ke vi akceptis miajn klopodojn por la ĝenerala interkompreniĝo per Esperanto. Neniam mi perdas kuraĝon eluzi la eblecojn, kiujn povas doni por la kreskigo de homaj kapabloj la etika kaj scienca heredaĵo de la homaro. Ni bezonas multajn «amikojn de Esperanto», kiuj favoras Esperanton kaj subtenas nian celon. El mia sperto mi scias, ke la solvo de lingvaj problemoj konsistas el simpligo: la asimilo de elementoj el pluraj lingvoj kaj la klopodo prilabori plurajn lingvojn.

Mi opinias, ke Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ sinteno rilate al la vivo. La fakto, ke Esperanto proponas eblon ligi landlimtranspaŝajn kontaktojn simple kaj rapide, antaŭpremisas la deziron entute kontaktiĝi kun homoj el aliaj ŝtatoj, de alia haŭtkoloro kaj kun akceptendaj aliaj kutimoj. Tio estas idearo, kiu, se oni entute rigardas ĝin el la politika angulo, estas alkalkulenda pli al la maldekstra ol la dekstra spektro. Tiel rigardite, mi kategoriigus la Esperanto-movadon kiel minimume politikan. Sed pli mi tendencas vidi ĝin kiel homamikan organizaĵon kun aparte efika rimedo de interkomunikado.

Prave, lakonaj respondoj estus: «Ne, ĝi estas nur lingvo» aŭ «Jes, ĉio estas politiko», sed la signifo de la demando estas pli grava ol oni supozas, rigardante supraĵe la fenomenon. Por tiuj, kiuj konsideras Esperanton «nur lingvo» la estonto de tiu ĉi lingvo dependas de ĝiaj ecoj, kaj tial oni emas «ŝanĝi», «plibonigi» la lingvon, naive kredante, ke nur iuj ĝiaj «malperfektaĵoj» malhelpas la rapidan progreson de Esperanto en la mondo. Fakte, Esperanto estas unuavice, hodiaŭ, politika problemo, ĉar:

- a) Ĝi celas ŝanĝi ion en la mondo, kaj tio ne estas «nur lingva» fakto;
- b) Ĝi estas manifestiĝo de demokratia pensado, fontas el la aliĝo al la demokratiaj ideoj: egal-eco, frateco de la homoj, paco, amikeco, forigo de la diskriminacio, de ĉiu ajn perforto ktp. kaj tiaj estas politikaj problemoj; ĉu Uno, Unesko ktp., samcelaj, ne estas politikaj aferoj?
- c) Ĝia akcepto kiel ilo por la internacia komunikado ne kuŝas hodiaŭ en lingvaj aspektoj (funkciado de la lingvo ktp.), sed en la manoj de la politikaj faktoroj. Ĝi nuligas ekonomiajn, ideologiajn, kulturajn, eĉ strategiajn avantaĝojn de iuj landoj grandaj, riĉaj, fortaj, kaj tiuj avantaĝoj estas apogataj kaŝe ne nur de la koncernaj

landoj, sed ankaŭ de la registaroj, kiuj ekonomie, politike, armee dependas de tiuj ĉi.

- ĉ) Koscianta pri la politika karaktero de la problemo, ni komprenas kial, dum la «malvarma milito» ĉiu el la du tendaroj, sed precipe la socialisma, malfavoris ideon, kiu propagas la «neŭtralecon» en la propra sfero.
- d) Por la strategio de la Esperanto-movado gravas la klareco pri la politika karaktero de la internacia lingvo, ĉar tio persvasas nin agi pli efike sur la kampoj, kiuj povas influu la politikajn decidojn: la sciencistoj, verkistoj, ĝenerale la kulturkreatoj, ĉar ili havas prestiĝon antaŭ la registaroj, antaŭ la intelektularo – faktoro kun grava rolo en la amaskomunikiloj, en la opinioj de la socio – kaj ankaŭ antaŭ la junularo kaj ĝuste antaŭ la registaroj.\*
- e) Ankaŭ se Esperanto estus «nur lingvo», ĝi tamen povas havi politikan signifon: en Eŭropo ekzistas 37 etnaj konfliktoj kaj ĉiuj alprenas ankaŭ lingvan aspekton. En la historio de la naciaj kulturoj, la lingvo rolis kiel politika faktoro: la unueco de la lingvo iĝis argumento por la politikaj celoj kaj restis ĝis hodiaŭ unu el la elementoj, kiuj karakterizas la nacion. Konklude, la lingvo ĝenerale kaj Esperanto speciale estas serioza politika fenomeno.

-----  
\* Estas grava eraro, kiun montras la historio de la Esperanto-movado kaj strategia analizo de la movado en diversaj landoj, subtaksi la rolon de la intelektularo, precipe de la sciencistoj, por la progresigo de Esperanto mondscale. Ĉiuj kulturaj movadoj en la historio – kaj Esperanto estas tia – estis faritaj per la intelektularo – kio ja estas facile rekoneble. Iuj esperantistoj asertas, ke «la sciencistoj ne interesigas pri Esperanto». Sed la Esperanto-movado jam havas multajn sciencistojn kaj en UEA, SAT, MEM kaj en AIS, ISAE, Akademio Comenius ktp. Ĉu kredi, ke nur tiuj ĉi kapablas kompreni la veron de la internacia lingvo kaj ĉiuj aliaj sciencistoj de la mondo troviĝas sub la intelekta nivelo de simpla esperantisto?

ne. laŭ mia opinio esperanto ne estas politika afero. esperanto estas lingvo. ĝi estas kreita por venki la «murojn de miljaroj», kiuj disigas la popolojn. esperanto estas ilo por transponti lingvajn barojn. nurnure tio ne jam havas politikan ion.

sed eblas politikigi esperanton. lanti skribis: «ĉu oni logike povas aserti, ke la kapitalismo ne kapablas starigi en la mondo internacian lingvon?»<sup>1</sup> sed tiu internacia lingvo ene de kapitalisma sistemo povas servi nur plejigon de mona profito. ĝi ne helpas al pli vivinda socio. tial ni mem ekagu. lanti skribis: «Ni prefere klopodu laŭ la plej bona maniero uzi la ilojn, kiujn kreas la kapital-

Ĉu Esperanto estas politika afero?  
(daŭrigo de paĝo 11)

ismo, por nia klasbatalo kontraŭ tiu sama kapitalismo.»<sup>2</sup> jen: per la uzo esperanto fariĝas politika – ege politika – afero. kiel ni uzu esperanton? ankaŭ jen scias bonan respondon kamarado lanti: «Por pli bone k sukcese kontraŭstari al la kapitalisma ekspluatado, la Laboristaro devas sin organizi mondscale. Kaj por tion fari kiel eble plej facile k celkonforme, ĝi devas ankaŭ raciigi sian organizan laboron per forigo de la lingvaj baroj.»<sup>3</sup> jen tiel esperanto fariĝas politika afero: kiel ilo uzata por atingo de politikaj celoj.

estas, cetere, interesa konstato, ke kelkajn politikajn celojn dum lastaj jardekoj transprenis de la laborista esperanto-movado la «neŭtrala» movado. la laŭstatute neŭtrala uea intertempe tro dense interplektiĝis en internaciaj instancoj kiel unesko, rezulte de kio naskiĝis tiel strangaj «manifestoj» kiel la praga, tiel ke oni apenaŭ plu povas opini ĝin neŭtrala. yves peyraud, prezidanto de la plenumkomitato de sat, diris ĉi-jare en intervjuo al *heroldo*: «Dum jardekoj, la SAT-anoj kriis For la neŭtralismon!': nun la t.n. neŭtrala movado malneŭtraliĝis de la interno.»<sup>4</sup>

se la iam neŭtrala esperanto-movado intertempe tiel evoluis direkte al politike maldekstra esperanto-movado, kiuj povas esti plu la celoj de tiu politika movado? esperanto-movado estas tro malforta, por ke la sama laboro fariĝu dufoje de du organizoj. aparta libera esperanto-movado bezonas ekzistokialon. ĝi ne prizorgu la samajn taskojn, kiel la «neŭtrala» movado. tion ĝi eĉ ne kapblas. tion ĝi lasu al la «neŭtrala». lanti skribis: «ni ne trudu al la movado taskojn, kiujn neŭtraluloj povas nuntempe ankoraŭ plenumi.»<sup>5</sup> ni prizorgu tiujn aferojn, kiujn la neŭtraluloj neglektas.

<sup>1</sup> artikolo «De la deziro al la efektivigo...» (1928 01 05). el *Vortoj de Kamarado E. Lanti*, 2a, neŝanĝita eldono, Laroque Timbaut 1979, p. 24-25

<sup>2</sup> la sama artikolo en la sama verko, p. 27

<sup>3</sup> la sama artikolo en la sama verko, p. 26

## lingva angulo

Jen eminenta verko, kvazaŭa «dua *Proverbaro*», plena de elvokivaj kaj trafaj frazeologiaj esprimoj kaj proverboj: **Domfabriko: 6000 frazeologiaj esprimoj hungaraj-esperantaj**

de Ada Csiszár kaj Kálman Kalocsay (Hungara Esperanto-Asocio. Budapeŝto 1975). Kelkaj tipaj inkluzivaĵoj:

- Esti forca bedo de malkonkordo.
- Teni iun per kondukilo. Lasi iun iri laŭ longa kondukilo.
- Esti gluiĝema de malpuro.
- Li falas plandalsube kiel kato.
- Persvadi iun (knabinon) mola.

<sup>4</sup> artikolo «Yves Peyraud: SAT hava morgaŭon» el *Heroldo de Esperanto* (n-ro 1935-1936) de 1997 04 20, p. 1

<sup>5</sup> artikolo «De la deziro al la efektivigo...» kiel supre citite, p. 26

## Faklibroj

Ĉiam estas plezuro por mi viziti la plej grandan librejon en mia loĝloko. La plenplena librobretaro estas dismetita sur multaj etaĝoj. Sur la bretaro troviĝas ne nur romanoj, sed ankaŭ faklibroj por ĉiuj situacioj dum la vivo. Ekzemple «kiamaniere mi fariĝis nefumanto» aŭ «kiel mi kaptas por mi edzon» ktp. Eĉ malgranda kafejo troviĝas tie, per kio oni povas fari paŭzon. Kiam oni ne tuj trovas difinitan libron, tiam sur ĉiu etaĝo troviĝas volonte helpemaj oficistinoj. Mi nomas ilin «anĝeloj». Unufoje mi demandis iun el tiuj afablaj anĝeloj: «Pardonon! Kie mi trovas librojn pri esperantologio?» «Esperantologio, jes ja, subteretaĝo, maldekstra flanko, en la fako «esoteriko». Mi dankis afable kaj migris al la subteretaĝo. Tie mi fariĝis sciavida, ĉu esperantologio estas esotera. Memkompreneble mi trovis nenion. Aŭ la lastan libron aĉetis iu antaŭ kelkaj minutoj, aŭ ĝi staras en la fako por filozofio, aŭ ĝis nun neniu demandis pri ĝi en tiu librotemplo. Tiam flustris al mi iu diableto en mian oreton: «Demandu alian anĝelon pri Esperanto! Eble ŝi diros: Dua etaĝo, fako 'manĝado kaj trinkado'. Povas esti, ke ŝi opinias, ke Esperanto – simile kiel *Estragon* (=drakunkolo) – estas iu spicaĵo.» Tamen mi ne demandis, sed mi grimpis al la dua etaĝo kaj serĉis en libro pri vinomarkoj: ĉu oni jam notis la kvalitmarkon «Esperanto»? Ankaŭ tie mi ne malkovris iom. Eble, mi diris al mi, la libro estas tro malnova. Sed mi scias, ke antaŭ nelonge mi legis en iu el niaj mondfamaj Esperanto-revuoj pri vino kun la nomo «Esperanto».

KHK

- Ebria kaj fola estas verparola. Kiu diras la veron, havos suferon/sur la kapo tuberon.
- La vorto ŝvebas sur lia lango.
- Inter parolo kaj faro estas tuta maro.
- Sorbi ies parolojn/vortojn.
- Disŝutadi sloganojn kiel konfetojn. [Se oni demandus al vi, kiel diri «am laufenden Band Sprüche klopfen», ĉu vi ne ankaŭ momenton hezitus?]

Necesas averti eventualan uzonton, ke la lingva materialo estas ordigita laŭ hungaraj kapvortoj. Do por nehungaroj pli libro por studi ol konsultilo. Facile traserĉebla elektronika (aŭ papera) versio estus utiliga, se iu emus pretigi ĝin.

GM